# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 2 Februaro, 2014

*Kara Leganto, kiel estis promesite, januaran n-ron de nia bulteno tuj postsekvas februara, poste – decembra (2013) kune kun marta. Ni esperu, ĉar - Esperanto! La proponita n-ro estas ege nekutime politikeca, denove – tio ĉi estas ligita kun la lastaj eventoj en Ukrainio. Estis tradukitaj multaj tekstoj en Esperanton (vidu sube) por konatigi internacian komunumon kun la vera stato en la lando. Ĉu tio plaĉas al vi, aŭ – ne, bv reeĥi.*

*Atenton, la februara kunsido okazos laŭ la adreso: Cobbler Square, 1350 N. Wells St., Chicago, IL 60610 (stacioj de: Ruĝa linio – Division/Clark; Bruna linio – Sedgwick). Espereble en Marto ni revenos al la Biblioteko.* –La Redakcio

## Politika Kanto

La protestoj, komenciĝintaj sur la centrala placo de la ukraina ĉefurbo Kijivo – Majdan Nezaleĵnosti (ukr. Placo de la Sendependeco) – kontraŭ mensogoj de prezidento Viktor Janukoviĉ, malhomecaj agoj liaj, granskala protektata koruptado, forŝtelado de la ukraina buĝeto enigis en multajn lingvojn neologismon "majdano" kaj renaskis la iome forgesitan ĝenron de politika kanto. La laston faris tri fondintoj de la iam populara muzik-teatro Ne ĵuris'! (ukr. Ne enuu) la verkistoj Jurij Vinniĉuk kaj Andrij Panĉiŝin, kaj la muzikisto Viktor Morozov. La tagon post la atako, la 1-an de Decembro en Interreto aperis tri kantoj plenumitaj de Viktor Morozov. Poste nova kanto aperis preskaŭ ĉiutage kaj nun ilia kvanto en la retejo Reverbnation.com atingis duoncenton. Kris Long, renoma esperanta poeto kaj tradukisto el Britio, konsentis esperantigi la tekston de kelkaj kantoj. Tradukoj aperos baldaŭ en "Beletra Almanako" (Nov-jorko). Hodiaŭ al vi estas proponata kanto okaze de la Nova jaro de Ĉevalo (laŭ Orienta kalendaro). *–Araneo*

## Sur la Ĉevalon




*de Andreo Panĉiŝin*
*Tradukis Kris Long*
*09.01.14*




Komenciĝas jaro de l' ĉeval' –
sed mi fajfas, venos aĉa fal'.
Dum bonvolas drinki Prezident'
kun popol' en grava ĉi moment'.
Ek, ĉeval', ek, ĉeval'!
Seli kaj Rusion celi.
Ek, ĉeval', ek, ĉeval'!
Por ne feki en sitelon –
sed mi vidos adiaŭe ĝias la voj':
oran karan necesejon, lastan foj'...

Mi valizon pakis jam, rajdant',
ke ne povu kapti min Majdan'
Dum bonvolas drinki Prezident'
kun popol' en grava ĉi moment'.
Ek, ĉeval', ek, ĉeval'!
Seli kaj Rusion celi.
Ek, ĉeval', ek, ĉeval'!
Por ne feki en sitelon –
sed mi vidos adiaŭe ĝias la voj':
oran karan necesejon, lastan foj'...

## El nia Politika Leterkesto

### I. Deklaro de la Ukraina Centro de la Internacia PEN-Klubo



La 16-an de Januaro ukrainiaj aŭtoritatoj trans-iris la ruĝan linion, kiu disigas duon-aŭtoritatajn reĝimojn de la aŭtentaj diktaturoj. La leĝaro, kaŭĉuke stampita de la parlamento en bufona permana balot-proceduro, furioze frapegis la civita-najn rajtojn kaj politikajn liberecojn de ukrainaj civitanoj, inkluzive la liberecojn de parolado, informo kaj kunvenoj. La leĝaro metis eksterleĝe la aktivecon de la ne-registaraj organizoj, forigas la restaĵojn de sendependa juĝistaro, kriminaligas iun ajn sendependan sekvadon de registaraj orgenoj kaj fine malebligas liberan politikan konkurencon en la lando.

Tiuj kontraŭkonstituciaj leĝoj tute antaŭvide aktivigis kontraŭregistarajn protestojn, daŭrantaj de fino de Novembro. Unua foje en la historio de sendependa Ukrainio, al protestantoj estis aplikita perforto, almenaŭ du manifestantoj en Kijivo estis mortpafitaj de la polico kaj multaj – vunditaj.

Nian specialan zorgon elvokas polica brutaleco kontraŭ ĵurnalistoj. Ĉiuj signoj montras, ke la polic-fortoj ne nur ignoras ĵurnalistajn certigilojn kaj vestaĵojn, sed intence celas, retenas kaj batas ilin, rompas fotilojn kaj detruas video-materialojn. La plej matrankviliga estas la forŝtelo de homoj en diversaj urboj per sekreta sekureco oficiroj aŭ per krimuloj, kunlaborantaj kun la potenco. La uzo de tiaj ekster-leĝaj kvazaŭarmeaj grupoj, nomataj kiel "tituŝkoj", por turmentado de civitanaj aktivistoj kaj okazigo de diversaj provokoj, lokigas la ukrainajn regantojn inter la plej monstraj hodiaŭaj diktatoraj reĝimoj.

Dum la pasintaj du monatoj, la prezidento de Ukrainio kaj lia registaro ne montris intencojn al intertrakto aŭ kompromito. Tute male, ili persiste streĉis la ŝraŭbojn, faris pli cinikan maljustecon, profundigis alfronton kaj provokis perforton. Ili restis surdaj al ĉiuj moderaj voĉoj kaj ☞

alvokoj al paco. Ŝajnas, ke ili komprenas nur la lingvon de forto.

Ni kredas, ke estas tempo ankaŭ por la internacia komunumo uzi tiun lingvon. Ni alvokas niajn kolegojn tra la tuta mondo ne nur esprimi sian apogon por ukrainaj verkistoj kaj ĵurnalistoj, sed montri sian solidarecon kun la ukraina popolo. Ni alvokas vin mobilizi viajn demokratiajn sociojn kaj pliigi premon sur viaj registaroj por ili okupu pli severan pozicion kontraŭ reĝimo, kiu kondukas la landon por plua perforto kaj sangoverŝado. Ni alvokas al sankcioj kontraŭ reĝimo, kiu rompas homajn rajtojn, inkluzive de la plej fundamentaj: la rajto je vivo kaj la rajton je libereco. De homoj, kiuj malestimas demokration kaj kalumnias Okcidenton en sia propagando, kiu ŝtelas de ukrainoj la dignan vivon kaj eŭropan estontecon, oni devas forpreni eblecon ĝui la avantaĝojn de okcidenta vivo, sen-vize vojaĝi kun t.n. diplomataj pasportoj kaj forlavi tra la okcidentaj bankoj monon, forŝtelita de la propra popolo.

*–Miroslavo Marinoviĉ, Prezidento*

---

## II. ALVOKO al UN Konsilio pri Sekureco

*Indikante la tragikajn cirkonstancojn, mortojn kaj batadon de partoprenantoj de pacaj protestoj en Kiijvo;*

(....mallongigite....)

Gvidita de artikoloj 39, 40, 41 kaj 42 de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj,

Ni adresas al vi la jenajn apelaciojn:

1. Urĝe konsideri la ukrainan temon kun la celo halti la malobservojn de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj kaj ĉesigi pluan ekspansion de tiuj malobservoj kaj la minacoj al la vivoj de protestantaj ukrainoj.
2. Kondamni la agojn de la oficialaj instancoj de Ukrainio. Submeti la kazon pri miskonduto kaj malobservoj de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj fare de la aŭtoritatoj de Ukrainio al la Internacia Tribunalo por esploro.
3. Postuli de la oficialaj instancoj de Ukrainio urĝe haltigi la mortigojn, persekutadon, torturojn kaj malobservojn de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.
4. Konsideri la eblecon sendi en Ukrainion UN-specialan interpacigan mision kun la celo por halti la malobservojn de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.

*–Estro de la Popola Registaro*

---

## III. Komuna Lingvo Povus Helpi Unuigi Dividitan Ukrainion




Lastaj seriozaj eventoj en Ukrainio ŝajnas esti ĝusta ekzemplo de la Zamenhofa tezo, ke manko de la komuna lingvo disigas la popolojn. Dum mia lasta vojaĝo al Ukrainio mi rimarkis, ke la konflikto inter la pro-eŭropa Okcidenta Ukrainio kaj pro-rusia Orienta Ukrainio havas lingvo-probleman karakteron. Grava faktoro de la divido de ukrainaj orientanoj kaj okcidentanoj estas iliaj malsamaj lingvaj preferoj. Kvankam ambaŭ komprenas (kaj eĉ parolas) ambaŭ uzatajn lingvojn, la pro-rusia oriento preferas uzi la rusan lingvon kiel la unuan, dum la pro-europaj okcidentanoj insistas, ke la lingvo de Ukranio devus esti ununure la ukraina. La uzo de la rusa lingvo estas postrestaĵo de la malamata soveta periodo. Tiam Ukrainio restadis enigita en la Sovetan Union kun la rusa – "la lingvo de internacia komunikado". Paroli ruse estis avantaĝe, dum la ukraina lingvo estis diskriminaciata. Nun ne plu la okcidentanoj volas similan situacion, kaj prave volas la ukrainan por Ukrainio.

*–D-ro Leszek Kordylewski*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

- 25an de Februaro – Tina prelegos pri la vojaĝo tra Georgio, Norda kaj Suda Karolinoj. La kunsido okazos laŭ adreso: Cobbler Square, 1350 N. Wells St., Chicago
- 25an de Marto – Poezian Vesperon, dediĉita al 200-jara datreveno de la plej fama ukraina poeto Taraso Ŝevĉenko, gvidos Araneo
- 22an de Aprilo – Elpaŝos Gregoro Dolgin: "Rilate al tradukado"
- 22an de Junio – Tradicia E-pikniko